

Bulteno eldonita de la  
Esperanto-Federacio de  
Langvedoko-Rusiljono

# Sudfrancia stelo

Bonvolu sendi viajn informojn,  
fotojn artikolojn, kaj novaĵojn  
al Christian MOURE 15, rue  
du Verdier 34120 TOURBES  
([xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr))  
Dankon al ĉiuj por viaj  
kontribuoj al SFS.

N° 194



esperanto  
France



Esperanto-Renkontiĝo ĉe Mediteraneo  
Seto de la 22a ĝis la 26a de aprilo 2011

Vendrede 22a en Lazaret 20a 30

Sabate 23a ĥino Comedia 20a



FaMo

Esperanto  
FILMO

Dominique Gautier prezentas  
sian filmon «Esperanto» premiere

Sabate 23a en teatro Georges Brassens 22a

Jacques Yvart  
kantas  
Georges Brassens  
en Esperanto



Dimanĉe 24a en teatro Georges Brassens 21a



Kapriol! frisa folkmuziko  
Kaj Tiel Plu tradicia kataluna/okcitana



Lunde 25a en Lazaret 21a



TTT:  
Teatro Trupo de Tuluzo  
Patric:  
okcitana kantisto  
JoMo kaj Solmiška:  
slava etoso



<http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php>



## POEZIA KONKURSO en PERPINJANO 2010

La dimanĉon la 10an de oktobro, Claude Willers prezidanto de la "Grupo Poezia kaj Arta de Rusiljono" GPAR proklamis antaŭ preskaŭ plena salono la rezultojn de la jara konkurso. Nur 5 esperantistoj partoprenis al la tria eldono de la konkurso malfermita al Esperanto. Al la nomo de René oni aldonis la nomon de Colette forpasinta en januaro de tiu-ĉi jaro tiel fariĝis « Premio René kaj Colette LLECH-WALTER ». S-ino Nicole Subiros ofertis belajn rememoraĵojn al ĉiuj premiitaj partoprenantoj por daŭrigi la agadon de



### **Tero**

**Lulu mi, tuta tero, lulu min  
Enŝirmu min via sino  
Kiel en ma patrino ventro  
Dormigu min horizonto**

**Tiom mankas al mi kuŝo  
En ia sulko profunda  
En mallumo, en silento  
En valo tenerdekliva**

**Ho, al novembra fosaĵo,  
Kun haroj tra velka herbo,  
Okuloj ĉielen, membroj  
Pli palaj ol frosta roĵo**

**Amu min, ter' amata, vartu min,  
Malglataĵon sur via flank'  
Ion el vi, ian frukton,  
Iun el viaj gefiloj**

M-France CONDÉ-REY

Colette kies amikino ŝi estis. Arno Lagrange deklamis kaj tradukis la 2 poemojn « Tero » kaj « Rusiljone 2 ». Dum la iom longa ceremonio (estas multaj premioj!) catalanaj dancistoj gajigis la publikon!

## **La venonta konkurso de GPAR okazos inter februaro kaj majo 2011.**

Informos :

<http://sites.google.com/site/konkursojenperpignan/>.

### **Rezultoj de la konkurso 2010:**

Premio « René et Colette LLECH-WALTER»

1-a Premio: M-France CONDÉ-REY el Angoulême - « Tero » 1-a Premio: Pascal VILAIN el Tarandean (83) novelo « Savo » 2-a premio: Simona Georgina FISUS el Rumanio « Rusiljone 2 » JFP



### **Rusijone du**

**Kiel sonoras  
Juna oriol'  
Dum junio.  
Russ ! Russ !  
La sonorilo  
De l' 'Granda Ursino'  
Ruze joris  
Kiel julo.  
Rojas la suno  
Laŭ mia ulno.**

Simona Georgina



## Savo

Dimanĉa posttagmeza etoso. La vetero, aĉa jam de pluraj horoj, ne instigis al promenado. Tial tuj post la tagmanĝo, ĉiu trovis taŭgan okupon, sed ne sen longa hezitado ĉar la familio kutimas marŝi kiam ĝi ferias.

Helena, kies patrino statuso kutime postulis multe da taskoj, plezure reprenis siajn trikilojn, pensante: "Pluvo falanta, trikotaĵo finota". Marko, ŝia edzo, kiel kutime nenion faris. Aŭ pli ĝuste tion ŝajnis: li verdire ŝategis de tempo al tempo dediĉi plenan atenton al la hejmaj bruetoj. Denaske blinda, li ja iĝis spertulo pri identigo de ĉiuj sonoj. Tintado de la trikiloj, aera susurado en la radiatoroj, gutado el aĉa krano, apenaŭ percepteblaj spiradoj de liaj familianoj, kutimaj movoj de la infanoj, eĉ ne bruaj, eĉ en ne tute proksimaj ĉambroj... nenio estis por li neaŭdebla. Marko bone sciis, ke Teo estas studanta ĉe sia skribotablo, pro pluma grincado sur la papero, pro libra foliumado, pro priserĉado en la lerneja ilujo. Li same bone perceptis la akvan plaŭdadon en la banujo. Maria ja sin banis! Cetere, ŝi estas tre facile situigebla en la domo : ĉiam kantante, ŝi kutime lasas voĉajn spurojn, kie ajn ŝi troviĝas.

Subite, Marko nerimarkeble ekpanikis!

For la trikiltintadon kaj la paĝo-susuron... lia tuta atento streĉiĝis, koncentriĝis. Regis nenormala silentego en la banĉambro. Nek kanta murmuro, nek elfluo de akvo pruvis la daŭran ĉeeston de lia filino en la banujo. Sed ŝi ne eliris, li tion certigus je sia vivo! "Helen', venu tuj... Maria...!"

Lia edzino ne bezonis plian ripeton : la vizaĝo sufiĉe elokventis, por ke ŝi tuj komprenu la urĝecon de la situacio. Bone sciante sin orienti en la domo, li jam antaŭiris ŝin al la banĉambra pordo... Ili ambaŭ eniris.

Ĉu pro troa varmeco, abundega vaporo, ĉu pro misfunkcio de gasa aparato, ili ankoraŭ ne bone sciis, sed estis fakto : Maria senkonsciiĝis, kaj ŝia kapo jam duonglitis en la akvon. Ili feliĉe ne tro malfruis kaj kapablis revigliĝi sian filinon. Sed nek Helena, nek Teo estus kapablintaj konscii pri tiu neesto de bruoj en la banĉambro.

Marko ne aparte fieris pro tio... Li malstreĉiĝis, iom post iom... Neniam ĝuinte la fortunon vidi, li ne ofte enviis la vidantojn - nur kelkfoje, kiam Helena naskis Marian, ekzemple - kaj nun, plian fojon li konsciiis, ke lia blindeco, male al neeltenebla handikapo, entenas virtojn ne konatajn de tiuj, kies okuloj bone statas.

Pascal Vilain

## La 95a U.K. de Esperanto en Havano (Kubo)

La francoj estis la fremda grupo la plej nombra en tiu kongreso proksimume 120, krom la kubanoj, kiuj preterpasis 130 ĉeestantoj !

Post longa aviadila vojaĝo de Parizo al Havano, 9 horoj, ni vespermanĝis kaj tranoktis en la moderna Hotelo Prezidento apud la fama bordmara avenuo Malecon. La sekvantan tagon, matene ni foriris en luksa autobuso por viziti diversajn vilaĝojn kaj interesajn naturajn lokojn: grotoj, kaskadoj, kaj botanika rezervo, kie ni vidis strangajn vegetaĵojn sub tropika varmo. Nia simpatia gvidistino prezentis nin al kamparanoj, kiuj zorgas pri tabako plantejo kaj sekado de ties folioj. Ili invitis nin eniri en sian loĝejon kaj gustumi la tradician "mojito-n", trinkaĵo de rumo kaj citrona suko.

Rimarkinda la ĝentileco kaj afableco de kubana popolo malgraŭ la evidentaj problemoj ekonomikaj.

Post reveno al Havano ni ĉeestis je la inaŭguro de la kongreso en "Palacio de Convenciones" kun kune 1002 kongresistoj. La programo vaste diversa pro multaj kunvenoj, konferencoj, spektakloj kaj vizitoj al muzeoj kaj monumentoj tre malfaciligis la elekton ĉar ne eblis esti ĉie, ve!





Rapide alvenis la lasta tago de la solena fermo kun la kanto de himno "La Espero".

Certe ni neniam forgesos tiun fantastan feston de internacia amikeco en Kubo.



Renato FIGUEIRA

### **Promenado tra Montpellier kun Dominiko**

Li estas Brazilano, gasto de Véronique Bichon kaj Vendredon la 23an de Aprilo, Joelle kaj mi retrovis lin en la stacidomo por viziti Montpellier. Ĉar li estas studento pri historio, pli precize pri antikva kaj mezepoka periodoj, ni unue montris al li arkeologian prifosadlokon, ligitan al la estigado de la tria tramlinio. Tre rapide, ni daŭrigis la tradician viziton : Promenejo de Peyrou, kun la akvorezervujo superita per la grekstilaj kolonoj -sen skafaldo- la akvodukto, la sunhorloĝo – sen suno – Ludoviko la Dekkvara ĉiam rajdanta sian ĉevalon ... kaj ĉiam honorata per Triumfarko, kiu memorigas liajn militajn venkojn, la nuligon de la Nanta Edikto, kaj pli pozitive la konstruon de la Sudfrancia Kanalo, super kies historio kelkaj ŝvitas, kadre de la preparo al IREM. Laŭrado de la Plantĝardeno, en kiu oni povus legi : " Nous irons doucement par les ruelles fort pierreuses et tortueuses de cette vieille ville à cet antique Jardin où tous les gens à pensées, à soucis et à monologues descendent vers le soir ". P.Valéry. Katedralo kaj Medicinfakultato : admiro de la statuoj de la du famaj medicinfakuloj : P.J.Barthez kaj F.LaPeyronie ..., eniro en la korton kaj tie, surprizo por Dominiko kaj poste por ni ambaŭ : sendube la flanka vido de la katedralo tre belas sed ... pli interesas D. la vido de la anatomiamfiteatro, kiu memorigas al li templon en Rio de Janeiro ; sur la frontono de tiu-ĉi legeblas " Ordo kaj Progreso ", pozitivisma devizo de A.Comte ; la filozofio de tiu-ĉi inspiris la redaktantojn de la brazila konstitucio ; kaj komence de ĉiu monato oni rendevuas kaj kantas La Marseillaise. Grimpado, vagado tra la malnova urbo : admiro de kelkaj okultropuloj, de pentraĵoj kaj skulptaĵoj de Stéphane Pencreac'h en galerio SteAnne. Placo de la Komedio aŭ de la Ovo ; serĉo de la ovospuroj ; komparo de la malnova teatro kun la de malproksime vidata Corum. Trairado de la modernaj Poligono, Antigono ĝis la tramo. Antaŭen ĝis Montferrier ! Monique, Serge kaj Coline, la nepino akceptis nin en la kutima tiel agrabla etoso, por tagmanĝi – estu dankataj pro ĉio –. Dominiko kaj ni ĝuis i.a. la guston de la Serge-olivoleo kaj de la diversaj fromaĝoj – sed D. persistas en la prefero de "La vache qui rit". Jam la tria ! Ni ne plu havas tempon por viziti Aigues-Mortes, do Monique veturigas nin al la katedralo de Villeneuve-lès-Maguelone kaj al la apuda maro : D., kiu loĝas centre de Brazilo ne ofte tiun-ĉi kontemplas. Stacidomo kaj fino de tre agrabla tago, kun ĉarma kaj ŝercema Dominiko ; pri tiu lasta punkto ni ĉiuj estas plene "d'accord"!

Jeannine B

**UFE anoncoj** Bonjour, Nous avons reçu ces dernières semaines plusieurs lettres de la part de la Poste au sujet d'autocollant "Espéranto" qui étaient collés sur les boîtes aux lettres de la Poste. Je vous rappelle donc qu'il est non seulement légalement interdit de coller des affiches et des autocollants sur ces boîtes aux lettres, mais qu'en plus, cela peut porter préjudice à l'association. Il existe un grand nombre d'endroit où l'affichage est autorisé, d'endroit où l'on peut distribuer tracts et calendriers, pour ne pas avoir besoin d'enfreindre la loi. Merci à tous, Axel Rousseau Secrétaire Général

### **Kontribuu al la Panteono de Cseh-instruistoj Przemyslaw Wierzbowski**

Mi estas partoprenanto de trejnado por Esperanto-instruistoj de ILEI/UAM. Mia fina tasko ĉe ĝi estas verki tekstolaboraĵon, kaj la temo, kiun mi elektis, estas: "Panteono de Cseh-instruistoj". Por ĝi mi bezonas vian helpon je kolektado de datumoj pri la plej elstaraj, eminentaj, fervoraj, sukcesaj aŭ konataj el tiuj, kiuj gvidis Esperanto-kursojn laŭ la Cseh-metodo. Gravus kiel eble plej multaj detaloj pri iliaj: - personaj indikoj, datoj, - kleriĝo, profesio, - instruista kariero. Tre bezonataj estas ankaŭ fotoj de la personoj kaj de ilia laboro, fragmentoj de gazetoj kun memorartikoloj pri ili, iliaj propraj gazetmaterialoj, nekrologoj kaj laŭeble ĉio rilata al ili. Ĉiu ajn kontribuo estos por mi valora kaj helpa. Mi atendas reagojn de tiuj, kiuj pretas almenaŭ ete helpi al la kreo de ĉi disertaĵo. La laboro estos samtempe kontribuo al la datumbazo de [www.edukado.net](http://www.edukado.net), legebla de ĉiuj interesitoj.

Amike **Przemyslaw Wierzbowski** "Bjalistoka Esperanto-Societo" [pwierzbowski@gmail.com](mailto:pwierzbowski@gmail.com)



## AŬTUNA FEDERACIA KUNVENO en SÈTE la sabaton 16a de oktobro 2010

La kunveno okazas en ĉambro de «Feriejo « Le Lazaret »».

Arno LAGRANGE (AL) gvidas la kunvenon. J.F. PASSARELLA (JFP) protokolas.

Nur 14 partoprenantoj el 4 departementoj de nia federacio (11, 30, 34, 66) partoprenas.

Senkulpiĝis: Maria Perez, Véronique Bichon, Véronique Lamur, Line Maurel, Hélène Cazejust, Frédéric Bourquin, Jean Hénin, Francis kaj Monique Bernard, Joëlle Cuq.

**FEDERACIAJ STATUTOJ:** Notinde estas ke la « novaj » statutoj preparitaj kaj longe pridiskutitaj neniam estis oficiale deponitaj ĉe prefekturo. Ili celis pli bone akordiĝi kun evoluo de nia asocio. La estraro proponas oficialigi ilin post lasta relego. Findecido dum la venonta kunveno.

**PETOJ DE SUBVENCIOJ:** Por organizi la Interasocian Kunvenon en 2011(IREM), ni ne kreis novan asocion, do ni uzas la federacian asocian strukturon, tiel petoj de subvencioj estas faritaj je lia nomo. Meze de julio, la urbo Seto akceptis subteni nin. Peto al Departamento estis deponita fine de septembro (respondo en martol!) kaj al Regiono estos fine de oktobro (respondo ???)

**RAPORTOJ PRI LOKAJ AGADOJ:** Dum la lastaj monatoj kelkaj eventoj okazis en nia federacio. En Le Caylar (34) fine de julio, okaze de « Festival du Roc Castel » Hubert MARTIN prelegis pri E-o. GERBERNARD et Alain RUNEL organizis ekspozicion en Ste Eminie(48) (26-30/07) en Les Aires (48) komence de aŭgŭsto, en Ispagnac (48) la 2 lastajn semajnojn de septembro kaj en Langlade (48) la unuan semajnon de oktobro. La 36a Internacia Semajno de Esperanto okazis en Sète (22-28/08), 40 personoj partoprenis el Francio, Hispanio kaj Bulgario. Ne okazos Renkontiĝo en 2011.

La « tagoj de la asocioj » venigis novajn lernantoj: 3 en Béziers kaj unu en Montpellier. EN Lunel, en privata kolegio « ?????? », 23 junuloj partoprenas al kurso.



**RAPORTOJ PRI PARTOPRENANO AL ARANĜOJ:** Colette CARBONNEL partoprenis al la staĝo de la Fervojistoj de Toulouse kiu okazis en Boo-Silem (65) kun ĉirkaŭ 25 partoprenantoj (6-10/09).

Arie kaj Marlène BOUMAN partoprenis al Rusia Esperanto-Kongreso en Peterburgo (27-31/05), 120 partoprenantoj el kiuj 20 eksterlandanoj- Postkongreso okazis en Moskvo bonege organizita de Svetlana SMETANINA.

De la 5a ĝis la 19a de junio, teamo de federacianoj partoprenis al Eo-karavano per la trans-siberia trajno ĝis Ulan-Bator en Mongolio kie okazis la 6a Azia Eo-Kongreso (19-26/06).

Pluraj federacianoj kiel kutime ĉeestis la 18-a Internacia Eo-Semajno en Coma-Ruga (Katalunio), preskaŭ la duono de la 126 partoprenantoj estis francoj! Renato FIGUEIRA kaj Véronique BICHON partoprenis al la 95a Universala Kongreso en La Havano (Kubo) ĉirkaŭ 1000 personoj ĉeestis interalie multaj francoj. Véronique ankaŭ vizitis la Interancian Junularan Kongreson en Los Cocos (Kubo).



**PLANATAJ AGADOJ: IREM2011 22-26/04/2011 en Sète** ĝis nun ĉirkaŭ 80 personoj aliĝis- limdato de unua periodo prokrastis al 30/10/2010 kaj de dua periodo al 31/01/2011. Sed por rezervi loĝadon en « Lazaret » plej frue vi aliĝas plej certe vi havos la deziratan loĝejon! Estas preparanta aŭdiogvidilo por vizito de Sète, belaj voĉoj de nia federacio estas invitataj partopreni al preparado de la afero. Findecido okazos dum la venontan kunveno de LOKO (17/10). Federacio Provenco proponas finsemajna staĝo en novembro kun Cyril HURSTREL kiu certe utilos al federacianoj kiuj helpos dum la IREM. Necesas proviziri artikolojn kaj vendeblan materialon por IREM.

Laurence ESCLAPEZ prizorgos kolektadon de artikoloj pri diversaj temoj. Jam sinproponis pri redaktado: Monique EYSSERIC (garigo), Martine RAGONNET (lokaj verkistoj), Arno LAGRANGE (regiona historio),

Colette CARBONNEL (vinologio), Serge Eysseric (olivoleo), Beziera Grupo (kuirreceptoj), Casteln Groupo (Intermara Kanalo). Ne mankas aliaj temoj, redaktu kaj sendu al Laurence (18, rue J-Baptiste Lebas 34500 Béziers -rete: [esclapez.laurence@orange.fr](mailto:esclapez.laurence@orange.fr)). Arie BOUMAN rememorigas pri jamaj artikoloj eldonitaj okaze de la SAT-Amikara kongreso 2003 en Agde, li posedas la kongreslibron kiun li transdonos (li faris jam!!).

Pri eldono de diversaj tipoj de subtelerajtoj, Monique EYSSERIC proponas unu kun temo: garigo. Ĉu aliaj konkretaj proponoj?

**VENONTAJ NACIAJ kaj INTERNACIAJ ARANĜOJ kaj kunvenoj** (Ne kompleta listo, vidu ankaŭ <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>)

Ne okazos Z-Tago en Béziers tiu-ĉi jaro, la Montpeliera grupo invitas vin la 11an de decembro ekde la 10a je « Maison pour Tous l' Escoutaire » rue de razéteurs à Montpellier- Vi mem kunportos tagmanĝon.

Tradiciaj finjaraj aranĝoj en Germanio: 27a Internacia Festivalo en Nördlingen (Bavario) (27/12-03/01) 9a

### **36a INTERNACIA SEMAJNO de ESPERANTO en Sète de la 22a ĝis la 28a de aŭgusto 2010**

Sub la varma suno de la someraj ferioj, kunvenis 40 personoj el 3 landoj (Francio; Hispanio kaj Bulgario) por tre laborema studo de nia lingvo. Neniu komencanto tiu-ĉi jaro, do oni starigis 2 kursojn por perfektigi sian parolan scipovon, gviditaj de Anne-Marie Pètre kaj Claude Gerlat. Evgeni Georgiev akompanata de sia edzino Penka bulgardevenaj, kiuj loĝas en Vieno (Austrio) gvidis la perfektigan kurson. Oni ne nur studis sed ankaŭ ekskursis al abatejo de Valmagne, monto Saint Clair kaj lageto de Thau dank'al Serge kaj Monique Eysseric, Véronique Lamur kaj Frédéric Bourquin kiuj speciale venis al Sète por konatigi nian belan regionon. Kiel pasinjare, **la dimanĉon okazis okcitana balo, kiu plezurigis ĉiujn** kaj kreis bonan etoson por la tuta semajno.



la dimanĉon okazis okcitana balo, kiu plezurigis ĉiujn

Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken por familioj (27/12-03/01), 2a Novjara Internacia Semajno en Saarbrücken por junuloj (27/12-03/01).

Mediterranea Esperanto Semajno en Agay (26/02\_05/03/2011),

IREM 2011 en Sète (22/04-26/04/2011),

63a Kongreso de Fervojistoj en Liberec (Ĉeĥio) (7-14/05/2011),

67a IJK-Junuloj en Hlibivka (Ukranio) (14-21/07/2011)

Universala Kongreso en Kopenhago (Danlando) (23-30/07/2011)

84a SAT Kongreso en Sarajevo (Bosnio) (30/07-06/08/2011).

**VENONTA ĜENERALA ASEMBLEO en Béziers la 21a de majo 2011** (pliaj detaloj en la venonta SFS)

Post la tagmanĝo, Martine RAGONNET kaj Geneviève GAUBERT prezentis bildaron pri sia vojaĝo per transiberia trajno ĝis Ulan-Bator kaj tra Mongolio okaze de la 6a Azia Esperanto Kongreso. JF P.

Ĉu studoj povas okazi sen ekzamenoj, sajnas ke ne! Kvar kuraĝuloj pasigis la unuan gradon kaj du aliaj la duan gradon. Dankon al la ekzamenintoj, Claude, Evgeni kaj Gilbert Grignaschi. Ĵaŭde, pli ol dek federacianaj vizitantoj partoprenis al la tuta vespera kradrostado, kiu ĝis noktomeze iom tro bruigis la feriejon!!

Bedaŭrinde, oni ne povis diri antaŭ foriri « ĝis venonta jaro!! » ĉar la ISE 2011 ne okazos. Certe en 2012 denove la invito al someraj ferioj estos kaj poste la IREM2011, pliaj homoj partoprenos kaj revigligos la renkontiĝon. JF P.

Dum la Internacia semajno de Seto, kelkaj esperantistoj volis scii ĉu ili havas bonan maristan piedtenon ! **Ili enŝipiĝis sur malgrandan boaton** por viziti la lageton Thau. Antaŭe, la gvidanto disdonis liston de “kelkaj maristaj vortoj”. Ekzemploj: droni, ebrulo, marmalsano, ŝippereo, viskio, vomo, ktp....

kaj kelkaj vortoj de la Kapitano Hadoko! Unue, ni trapasis la setan havenon kie estis multaj tinusŝipoj kaj kelkaj kargoŝipoj. Nia boato ŝajnis tre malgranda proksime de la pramŝipo kiu venis de Maroko! Poste, ni subpasis la levantajn pontojn kiuj disigas la havenon de la lageto. Aventuremaj, ni krozis ĝis la ostraparkejoj: la famaj “Bouzigues” ostroj kreskas sur ŝnuretoj kiuj pendas de grandaj tabeloj kaj baniĝas en la lageto. La malgrandaj ostroj venas de la Atlantiko kaj kreskas en la lageto. Revenante, ni preterpasis la kajojn de la urbo, kie multaj koloraj boatoj estas fiksitaj. La krozado finiĝis sen “homo en la maro!” nek marmalsano!

F. BOURQUIN



Ili enŝipiĝis sur malgrandan boaton



la klaŭstroĝardeno ĉirkaŭ la fontoŝtono

## ABATEJO DE VALMAGNE

### LA ABATEJO KAJ LA PREĜEJO

La abatejo de Valmagne konsistas el preĝejo, fontoŝtono, klaŭstro, kanonikara ĉambro (ĉambro de la monaĥoj), kaj ĝardenoj. La abatejo estis fondita per Raimond de Trencavel, vicgrafa de Béziers, en mil cent tridek ok. La cistercia tutaj estas klasifigita historia monumento.

La nuna preĝejo konstruita en mil ducent kvindek sep, estas okdek tri metrojn longa kaj dudek kvar metrojn alta.

Dum du jarcentoj (dekdua ĝis dekkvara jarcento) la abatejo estis tre riĉa. Post tiu riĉa epoko, la abatejo suferis de la centjara milito kontraŭ la angloj kaj ankaŭ de la religia milito. La abatejo restariĝis dum du jarcentoj.

Bedaŭrinde por ĝi, la abatejo estis ruinigata dum la Francia revolucio en mil sepcent okdek naŭ. La lastaj monaĥoj forfuĝis. Post la revolucio, la abatejo estis vendita plurajn fojojn. La lasta posedanto estas la familio de la grafo de Turenne. Ekde tiu epoko, la preĝejo ŝanĝiĝis en vintenejo, vi vidos la barelegojn en la preĝejo.

### LA ĜARDENOJ

Interne de la abatejo, **la klaŭstroĝardeno ĉirkaŭ la fontoŝtono** ebligis al la monaĥoj promeni kaj ĝui la naturon. Ili ne rajtis eliri eksteren. La ekstera ĝardeno proksime de la kapelo sankta Blaise konsistas el mezepokaj kreskaĵoj, kiujn la monaĥoj manĝis kaj per kiuj ili kuraciĝis.

### LA VIREJARO

En la jaro mil okcent dudek, oni metis en la preĝejon la barelegojn el rusia kverko. Fakte, la preĝejo nomiĝas « Cathédrale des Vignes », la vito katedralo.

La vitoj estis kultivataj ekde la kreado de la abatejo, kaj nun kun respekto al la medio. Vi povus aĉeti diversajn vinojn : vinojn de « atestita origino » aŭ lokajn vinojn.

**Lexique** : vito : vigne, vino : vin, vitejaro : vignoble, vintenejo : chai, medio : environnement, atestita origino : appellation contrôlée, lokajn vinojn : vin de pays, barelego : foudre (gros baril)



La grupo antaŭ la abatejo

Bonjour de Bretagne

Je connaissais Sète parce que ma prof d'espéranto nous en avait parlé, mais nous ne pouvions y participer car notre semaine de rencontres à Plouézec coïncide avec celle de Sète : nous finissons et eux commencent. Mais, nous avons rencontré Jean François à Pau, au congrès de SAT-amikaro2010, et nous avons décidé avec mon amie d'y participer malgré tout! Nous avons fini notre bénévolat le 20 Août vers une heure du matin à Plouézec et avons pris le train le 21 à 7 h !!!! Un peu dur !!!!!

La rencontre avec d'autres espérantistes et aussi de revoir des personnes que l'on avait connues à Plouézec à nos rencontres, nous a beaucoup plu. Nous avons fait l'excursion de l'Abbaye de Valmagne (intéressante et curieuse) et celle du Mont ST Clair, tout autant intéressante. Nous avons suivi le cours de Claude Gerlat. (Pour ma part, j'aurais aimé avoir un cours intermédiaire entre les débutants et la conversation.)

Je suis venue à l'espéranto car il fallait que je continue à faire travailler mes neurones après la retraite, ensuite j'ai beaucoup aimé cette langue. N'ayant jamais appris aucune langue étrangère, j'ai trouvé l'espéranto assez facile et la vie associative me convient bien car il y a beaucoup d'échanges. Bien sûr, il faut donner beaucoup de son temps mais on apprend aussi beaucoup de choses.

Ce qui me plaît dans la langue ? La facilité que l'on a de parler dès les premières leçons. Bien sûr, il y a les noms composés, les ĝi, les ŝia qui ne sont pas toujours faciles à assimiler mais on s'accroche!!!!!!

Amike et ĝis revido Micheline (Vizitez mon new blog <http://www.esperanto.over-blog.net>)

Il y a deux ans, en me promenant à la foire aux associations de Montpellier, j'ai été attiré par un groupe de personnes parlant d'une voix chantante. Je me suis arrêté au stand espéranto et je fus invité par A. D. à m'asseoir avec ce groupe. Voilà mon début espérantiste.

Lors de la première rencontre J.F. P. fit la publicité pour le stage et je me suis inscrite. C'est mon deuxième stage de Sète, et je pense continuer.

Au stage nous sont proposées différentes excursions. J'ai choisi cette année la visite de l'Abbaye de Valmagne (voir article de V. L.).

Dans un site agréable, le lazaret à Sète, se déroulent les cours dans la bonne humeur. J'ai suivi le cours du premier niveau de A.M. P. entièrement en Espéranto. Alternaient les chants, la grammaire, des résumés de textes, des questions, etc... Les participants étant de même niveau, le cours était profitable pour tous. Le plus: durant le cours, être sollicité (pour répondre) de façon aléatoire et non dans l'ordre de la tablée.

En plus des cours et des excursions, il y a aussi des soirées jeux, films, conférences. Le stage permet de passer de bons moments, de retrouver des amis et de faire de nouvelles connaissances.

Je vous dis à tous à l'année prochaine.

R. C.

Fotoj pri la forumo de asocioj en Nimo la 4an de septembro. Maldekstre, Claude WURMSER, meze Lucas PERIER, dekstre Zohra MRAIHY.



Eduardo Berdor, juna hispaniulo, dezirinte viziti la sudan Francion inter kiu Nemozon, kontaktis la lokan esperantistan klubon per sia Prezidento, Frederiko Bourquin. Malfeliĉe, li estis ĵus ironte vojaĝon por siaj libertempoj kaj Zohra, esperantista instruistino, estis jam partita. Tiel, mi estis demandita por esti izola sia gvidanto.

Eduardo loĝis provizore en studentula domo kie ni rendevuis la merkredon la 11an de aŭgusto je la 9a horo. Poste ni ĉirkaŭpasis la arenojn por bone vidi ilin ekstere, ni iris sur la proksiman paradoplacon, Esplanado kie li fotis min apud la Pradiera statuon. Marŝinte, ni vidis krokodilan statuon sur la merkata placo, kaj poste kvar aliajn pajloŝtopitajn je la urbodoma ŝtupara plafono. Irinte je la granda fontana ĝardeno ni vidis la horloĝan turon (de la 18a jarcento), la kvadratan domon (nek kvadrata nek domo), la Artan kvadraton (kiu ŝajnas plie uzino ol alia aĵo), la Imperatoran hotelon kaj ni laŭiris la kanalon. Enirinte la

ĝardenon, ni vidis multajn statuojn kaj la Dianan templon (kiu neniam estis unu). Ni trairis gazonojn kaj boskojn suprenirinte ĝis la Granda turo malgraŭ liaj doloroj (memoriloj de lia pasinta veturila akcidento). De tie, ni havis belegan vidpovon sur la tuta urbo kaj estis fotitaj kune per hispanuloj pasante (vidu sube). Ni finis la piedviziton je la 12a horo poste vidinte la grandan templon (tre maloftaj en lia katolika lando), la Augustan pordon (ruino de remparoj kiel la Francan pordon vidita je la komenco) kaj Sanktan Perpetuon preĝejon (multe pli granda ol la katedralo).

La sekvontajn tagojn, li vizitis Arlon kun Luko (esperantisto de tiu urbo) kaj sole, per turistaj transportoj, Uzason (kiun li tute ne konis eĉ per ĝia nomo sed ĝi plaĉis multe al li per sia grandega ĉarmo), la Gardan ponton, la Baŭksojn kaj fine Avignonon sen la papa palaco per manko da tempo. Ĝis la revido, Eduardo !... Klodio WURMER

Ekde jaro 1987 nia franca senprofita asocio La Clef d'Argent (La Arĝenta Ŝlosilo) eldonas librojn, kiuj temas pri Fantasto, Fantazio, aŭ Scienca-Fiktio. Ni decidis krei novan kolekton de libroj en esperanto. La unua eldonita romaneto estas elfrancigita fantasta rakonto de la verkisto Jonas Lenn. Ni ankaŭ planas eldoni rakontojn originale esperante verkitaĵn.

Se vi deziras havi pli da informoj pri nia eldonejo, bonvolu viziti ĉi tiujn ligilojn: La Arĝenta Ŝlosilo: <http://www.argenta-slosilo.org>  
Nia originala franclingva retejo: <http://www.clef-argent.org>

Dankon pro dissendi la novaĵon. Kore, Philippe Gindre

La Arĝenta Ŝlosilo - senprofita asocia eldonejo, faka pri fantasto, fantazio, kaj scienca-fikcio - 9 rue du Stade - 39110 Aiglepiepierre - France retejo: <http://www.argenta-slosilo.org>



## Muziko kaj Esperanto en Kvinpetalo

(86410 Bouresse (Bures))

Kiel kutime ni kunigis de la 8a ĝis la 18a de aŭgusto 2010 en la esperanta centro Kvinpetalo. En familia kaj ĝoja etoso, ni multe laboris eĉ se ni ne estis multnombraj. La celo estis paroli esperante, kanti kaj ludi muzikon per instrumentoj. Ĉiutage ni rendevuas en la salono Waringhien, por prelegoj kaj paroladoj pri diversaj temoj.

Kia surprizo post la temaj klarigoj !

